

# Gazeto



# Andaluzia

36  
23  
15  
44



Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

19-a Jarkolekto \* Aŭgusto 2002 \* N-ro 69

ISSN 1576-0618



CASTRIL, kie la Naturo fariĝas kvieteco

# GAZETO ANDALUZIA

Fundada por D. José Garzón Ruíz, en San Fernando (Cádiz) en 1910.  
Órgano oficial de la Asociación Andaluza de Esperanto.

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto

REDACCIÓN: C/ Armengual de la Mota 33, 4-D, 29007 MÁLAGA.

DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. ISSN: 1576-0618.

IMPRIME: La Reprografía, MÁLAGA.

DIRECTOR: Andrés MARTÍN GONZÁLEZ

REDACTORES: José Francisco MARTÍN DEL POZO (Apartado 5184,  
29080 MÁLAGA, [esperanto@ciudadfutura.com](mailto:esperanto@ciudadfutura.com))

José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ  
([esperanto14@supercable.es](mailto:esperanto14@supercable.es))

COLABORADORES: Giordano MOYA, Luis SERRANO PÉREZ,

José Antonio VALVERDE MARTÍN, D-ro Wolfgang GUNTHER

## ENHAVO

Eĥoj el Esperantio .....	3
Esperanto-Infoj en Andaluzio .....	5
Eĥoj el Andaluzio .....	8
Melila Angulo .....	9
Dialogoj kun mia Edzino .....	11
La danĝero paroli la japanan lingvon. ....	14
Interlingvistiko: <i>Parroman / Universal / Unial</i> .....	15
Paĝoj de Nia Historio .....	21
Vorta Piramido .....	23
Solvo al Vorta Piramido .....	24
Blank-Nigre .....	24
Neŭtrala Int.Lingvo Estas Imanente Preventa Politiko... ..	25
Flamenko .....	27
Recenzo .....	28
Andaluza Kuirarto .....	29
Salutmesaĝo <i>Okaze</i> de la Int. Jaro de Ekoturismo .....	30
Turismi en <i>Castril</i> .....	32
Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio .....	34
Ordinara Asembleo Ĝenerala de A.E.U. ....	35
Esperanto Aplikata .....	36
Financa Raporto de A.E.U. (jaro 2001) .....	38

Noto: pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.  
La redaktoro rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn.



## ĤHOJ EL ESPERANTIO

*PRI KONGRESOJ***La plej amasa.-**

Preskaŭ 1.500 personoj partoprenis en la ĉi-jara Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en la brazila urbo Fortaleza. Ĉeestis gesamideanoj el 56 landoj, la plimulto el ili de Brazilo mem kaj de Japanio. La ĉeftemo de la Kongreso estis *Diverseco: ŝanco, ne minaco*, kaj por pritrakti ĉi temon oni kreis diversajn studgrupojn gvidataj de la usona Humphrey TONKIN.

La etoso dum la kongreso estis mirinda, ne mankis la muziko, la festoj kaj ĉefe la dancado, normale se ni konsideras, ke la UK okazis en Brazilo. Inter la konkludoj aprobitaj dum la Kongreso oni devas substreki la konsideron, ke la daŭranta integriĝo tutmonda kondukas al pozitivaj rezultoj, sed ankaŭ al malegalecoj kaj al la ĉiam pli rapida perdiĝo de malgrandaj lingvoj kaj kulturoj. Pro tio oni atentigas pri la graveco de la lingva dimensio de kultura diverseco, kaj substrekas la pretecon de la Esperanto-Movado kunlabori kun ĉiuj organizoj, ĉefe kun UNESKO, kiuj okupiĝas pri la kultura dimensio en internaciaj aferoj.

La venonta Universala Kongreso de Esperanto okazos en Goteburgo, Svedio.

**La plej gaja.-**

Ankaŭ en Brazilo, sed ĉi-foje en la sudbrazila urbeto Pato Branko, ĉirkaŭ 3.000 kilometroj for Fortaleza, okazis la 58a Internacia Junulara Kongreso de Esperanto. Partoprenis 100 gejunuloj, ĉefe el Brazilo, Argentino, kelkaj landoj de Centra Ameriko, Usono, Kanado, Japanio kaj kelkaj okcidenteŭropaj landoj.

Abundis la distraĵoj dum la Kongreso, ĉefe prezentaĵoj de la loka teatra grupo, kies membroj estis ankaŭ la respondeculoj pri la organizado de la renkontiĝo. Malgraŭ la ne tro-nombra partoprenantaro, oni nepre devas memori ke ĉi-jare la JJK okazis for Eŭropo, la ĝenerala konsidero estis, ke la kunveno de la juna esperantistaro estis bonega. Ĉi-jare pli kvalito ol kvanto.

## La plej fora.-

Dum la pasintaj 9a kaj 10a de julio okazis en la urbo Ulanbatoro la unua Mongola Esperanto-Kongreso. Partoprenis kvardeko da esperantistoj. Antaŭ kelkaj jaroj, dank' al la steboj de mongola junulo aperis la unua libro-metodo kaj vortaro de esperanto en la mongola lingvo.

Hodiaŭ pli granda grupo, ĉefe gejunuloj, defendas en ĉi tiu azia lando la rolon de Esperanto kiel kulturlingvon. Inter la projektoj de la Mongola Esperanto-Centro estas la starigo de Esperanto-Universitato.

## Kaj la plej proksima.-

De la 1a ĝis la 4a de la pasinta monato aŭgusto okazis en la urbo Alikanto la Hispana Kongreso de Esperanto. Inter la ĉefaj aktoj de la kongreso oni devas elstari la prezenton de la libro de Giordano MOYA *"Esperantismo"*, ankaŭ la prelegon de Tonjo DEL BARRIO pri elstara hispana esperantisto, kiu naskiĝis en Granado, la generalo Emilio HERRERA, kiu krom esperantisto estis unu el la pioniroj de la hispana aer-armeo.

Okazis ankaŭ prelegoj en esperanto pri la ĉina lingvo kaj pri la historio de Esperanto dum la bolŝevisma periodo en Rusio. Ĉar la kongreso okazis en la Valencia Komunumo eĉ ne estas necese menci, ke okazis ankaŭ grandega *paella*, per kiu la organizantoj regalis la ĉeestantojn.

Dum la Hispana Kongreso oni prezentis la novan poŝvortaron kiu nomiĝas *2002*. La aŭtoro estas la Akademiano Miguel GUTIÉRREZ ADÚRIZ. La nova vortareto celas anstataŭi la famegan *Lexicón Sopena* eldonita en 1967 kaj konstante reeldonita de la eldonejo dum la lastaj 35 jaroj. La nova libro estas poŝvortaro, tamen formate iom pli granda ol tiu de *Lexicón*, 17x11 cm-oj, kaj ĝi havas 474 paĝojn. Se Vi deziras aĉeti la libron sur la paĝo 26a Vi trovos la adreson de la Hispana Libro-Servo aŭ rekte ĉe la aŭtoro per la elektronika adreso: [liven@wanadoo.es](mailto:liven@wanadoo.es).

La venonta Hispana Kongreso de Esperanto, koincide al la 14a Eŭropa Esperanto-Forumo, okazos en Valencio de la 15a ĝis la 19a de julio 2003 ĉe la Fakultato de Filologio. Se Vi deziras ricevi pliajn informojn Vi devos kontakti kun Augusto CASQUERO, Avda. Burjasot 29 A-31 46009 Valencia aŭ rete en la adreso [augustocasquero@infonegocio.com](mailto:augustocasquero@infonegocio.com)

## Esperanto – Informoj de Andaluzio

\* Koincide al la okazigo de la Universala Kongreso de Esperanto en Fortalezo (Brazilo) la pasintan monaton aŭguston, aperis la 6a numero de la revuo *Jura Tribuno Internacia*, oficiala organo de Esperanta Jura Asocio kaj kuneldonita de nia asocio Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. En la 53 paĝoj de la revuo oni povas legi pri:

- La svisaj civitanoj aprobas aliĝi al Unuiĝintaj Nacioj.
- Eŭropa Unio kaj Rusio serĉas solvon por la enklavo Kaliningrado.
- Ĉu jura proceso kontraŭ genocido aŭ kontraŭ pres-libereco?

Kaj la jenajn artikolojn:

- Ĉu Eŭropo bezonas konstitucion?, de Rafaela URUEÑA ÁLVAREZ.
- La rajto je la ŝtataneco laŭ la brazila konstitucio, de Mauricio SIGNORINI PRADO DE ALMEIDA.
- Ateno kontraŭ Sokrato, de José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ.

Aperas ankaŭ recenzo pri la verko de Ronald J. GLOSSOP "*Monda Federacio? Ampleksa Analizo de Federacio Mondregistaro*" verkita de Kep ENDERBY.

Kaj ankaŭ la esperanta traduko de la Konvencio pri la Malpermeso de la Uzo, Stokigo, Produktado kaj Transferado de kontraŭpersonaj minoj kaj pri ĝia detruo.

La revuon ricevas ĉiuj membroj de Esperanta Jura Asocio. Se iu interesiĝas pri juraj temoj Vi povas peti senpagan ekzempleron de la revuo sendante leteron en la saman adreson de ĉi tiu revuo.

\* Kiel anoncite la pasintan 31an de majo okazis eksterordinara asembleo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo en la urbo Malago. Unualoke oni legis kaj aprobis unuanime la akton de la antaŭa asembleo, okazita en la monato oktobro 2001. Poste oni elektis du membrojn de la asocio kiu reprezentos delegitece AEU-n en la Forumo de Esperanta Civito. Oni elektis kaj nomumis tiurilate la membrojn de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo Julio HERRERO SEGURA kaj Andrés MARTÍN GONZÁLEZ.

\* La pasintan 2an de septembro la sevila ĵurnalo *Diario de Sevilla* publikigis artikolon subskribita de la prestiĝa ĵurnalisto Nicolas SALAS sub la titolo "Recuperar el Esperanto" (*Revivigi Esperanton*). La artikolo parolis pri la graveco de nia movado en la sevilo de la komenco de la pasinta jarcento, konkrete inter la jaroj 1911 kaj 1932. En ĝi oni parolis pri la demarŝoj faritaj de nia sevila samideano Juan de Dios MONTOTO DE SARRIÁ por kolekti ĉiajn informojn pri la tiutempa E-movado en Sevilo.

Komence de la artikolo, kiu plenigis kompletan paĝon, aperis 4 grandaj fotografaĵoj de diversaj momentoj kaj epokoj de la Sevilia Esperanto-Grupo. La ĵurnalisto petis informojn al la legantoj de la ĵurnalo pri la personoj kiuj aperis sur la fotografaĵoj kaj ankaŭ pri eblaj sciigoj de la tiutempa E-movado. La artikolo finiĝis kun la telefonnumero de Juan de Dios MONTOTO por ricevi ĉiuspecajn informojn pri la E-movado de tiu epoko. Ni gratulas nian sevilan samideanon pro la senduba sukceso kiu signifis la altiron de la atento de prestiĝa ĵurnalisto kaj ĵurnalo rilate la historion de Esperanto en Andaluzio kaj konkrete en Sevilo.

\* En la jaro 1982 fondiĝis la Sevilia Esperantista Junulara Organizo (SEJO) kie aniĝis ĉiuj sevilaj gejunuloj kiuj dum tiuj jaroj lernis la internacian lingvon Esperanton. Ĉi tiu asocio mem, kune kun la grupoj de Malago kaj Kordovo, poste naskigis Andaluzian Esperanto-Unuiĝon.

Do, ĉi-jare kiam okazas la 20a datreveno de tiu fondiĝo, grupeto de tiuj junuloj, kompreneble jam ne tiel junaj, planas renkontiĝi en Sevilo. Ankoraŭ ne estas decidite loko kaj dato, kvankam laŭ la unuaj informoj tio okazos en Sevilo (kompreneble) dum sabato de la monato novembro. Pliaj informoj Vi povos atingi de la organizanto de la renkontiĝo Antonio RODRÍGUEZ GASCH aŭ pere de la elektronika adreso de ĉi tiu revuo [esperanto14@supercable.es](mailto:esperanto14@supercable.es).

\* Kaj ni daŭrigas en Sevilo. La sevila esperantistaro volas diskonigi la lokon, tagon kaj horon de siaj renkontiĝoj. Ĉi tiuj okazas ĉe la *Ateneo Verde*, str/ Eustaquio Barrón n-ro 2, ĵaŭde je la 9'30 horo nokte.

\* Kiel Vi eble memoros, sur pasintaj numeroj oni parolis pri la eblecon aperigi la esperantan biografion de la kordova samideano Francisko AZORÍN IZQUIERDO ene de libro eldonota en Kordovo. Ja tio okazos venontjare. La respondeculoj de la onta verkaĵo kontaktis kun José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ kiu ellaboris eseon sub la titolo "*Aproximación a la Figura y a la Obra de Francisco Azorín Izquierdo como Esperantista*". Ĉi eseo aperos kune kun aliaj artikoloj pri la figuro kaj la laboro de ĉi tiu elstara kordova arkitekto ene de libro eldonota de la Universitato de Kordovo.

Francisko AZORÍN estis kordova arkitekto, politikisto kaj esperantisto kiu ludis gravegan rolon ene de la Esperanto-Movado en Hispanio ĝis la jaro 1936. Poste li ekziliĝis en Meksikion, kie li laboris senlace por la disvastigo de la internacia lingvo en tiu lando. Espereble, dank'al tiu kunlaboro la figuro de Francisko AZORÍN kiel esperantisto, krom kiel politikisto kaj arkitekto, estos pli konata ekster la E-etosoj.

\* Kiel en la pasintaj jaroj, ankaŭ ĉijare Andaluzia Esperanto-Unuiĝo ofertas partoprenaĵojn de la Kristnaska Loterio. La sukceso dependos, kiel ĉiam, de la personoj kiuj kunlaboros en la vendado de la partoprenaĵoj. Ankaŭ Vi povas kunlabori. Respondu, bonvole, kaj diru kion Vi pretas fari: kiom da partoprenaĵoj Vi pretas vendi kaj/aŭ aĉeti. Pensu, ke la Kristnaska Loterio estas unu el la mon-rimedoj per kiu la asocio kiu strebas la disvastigon de Esperanto en Andaluzio povas labori.

Se Vi deziras kunlabori sendu elektronikan poŝton al la adreso: [esperanto@navegalia.com](mailto:esperanto@navegalia.com) aŭ al la telefono 656407198. Dankojn.

---

**Disvendu kaj Aĉetu JAM la ĉi-jaran kristnaskan lotadon de AEU, ĉar sendube unu el la jenaj numeroj atingos la unuan premion**

**3.031 ~ 64.393**

Kion Vi atendas por esti kaj estigi milionulojn????

Kontaktu kun la adreso de nia Asocio.

## ◀ EĤOJ EL ANDALUZIO ▶

### Andaluza Infano de antaŭ dumil jaroj.

La arkeologistoj kaj la civitanoj de Jaeno jam al kutimiĝis al la historiaj eltrovoj en ĉi tiu andaluza urbo. Sed, antaŭ kelkaj semajnoj okazis io eksterordinara. La arkeologistoj trovis malgrandan sarkofagon el plumbo, materialo ne tre normala en la romiaj enteriĝoj kaj kio faciligas la konservadon de la homaj restaĵoj ene de ĝi.


Post intensa purigado far specialistoj de la Provinca Historia Muzeo de Jaeno ĵus oni eltrovis ĝian enhavon. Temas pri la restaĵoj de ina infano proksimume dujaraĝa. Por kalkuli la aĝon de la infano la specialistoj atente studis la femuroston, tamen la fakto ke aperis neniu laktodento pensigas ke, ĉu la infano estis pli aĝa kiam ŝi mortis, ĉu ke ŝiaj dentoj aperis antaŭtempe.

Apud la kranio aperis orelingoj el oro. Ankaŭ aperis aliaj ornamaĵoj, kiel ora ĉeno kaj vitraj restaĵoj, kiuj povus aperteni al boteleto enhavanta parfumon. Ĉi tiuj elementoj pensigas ke temis pri infano apartenanta al la reganta klaso de *Aurgi*, la romia nomo de la urbo Jaeno.

La sarkofago aperis meze de ŝtonplatoj el kolora marmoro, kio ja pruvas, ke temis pri la filino de iu altrangulo de la romia jaena urbo.

Antaŭ kelkaj jaroj aperis alia sarkofago en la sevila urbo Karmono, enhavanta la restaĵojn de infano. Tiujfoje la arkeologistoj ankaŭ surpriziĝis, ĉar tuj apud la restaĵoj de la infano aperis la restaĵoj de besteto, verŝajne kuniklito, kiu sendube estis la prefera ludilo aŭ la amuletbesteto de la infano.

La zono kie aperis la sarkofago en Jaeno estas riĉa je arkeologiaj eltrovaĵoj. Tiel, apud la trovita sarkofago aperis aliaj du tomboj de la jarcentoj 1a kaj 2a p.K. Ankaŭ aperis akvo-kanaloj, muelejoj kaj islamaj norioj. Enestas tiom da historiaj restaĵoj en tiu zono, ke antaŭ kelkaj jaroj la Kultura Delegitejo de la Andaluzia Registaro anoncis, ke oni planis starigi arkeologian parkon ĉe la zono por montri al ĉiuj interesitoj la restaĵojn jam malkovritaj.



La Historia Muzeo de Jaeno gardas verajn trezorojn, ĉefe iberajn restaĵojn.



# MELILA ANGULO

 José A. Valverde Martín

## NEKOHERAĴOJ

En ĉi tiu monato julio oni vivadis Hispanie nervozan situacion rilate al Maroko dank'al konflikto pro la insuleto Perejil (*Perehil*). Logike, Melile, oni vivadis la konflikton speciale kaŭze de nia proksimo al Maroko. Dum la konflikto, la maroka estraro uzis Melilon kaj Ceŭton kiel ilon por persvadi al la hispana estraro. Sed, historie, ekonomie kaj geografie, tio ĉi estas nekoheraĵo. Vidu ni skize ĝin.

Kial Maroko ekigis la konflikton pro la insuleto Perehil ?

a) Sahario. Tiu ĉi historie sendependa lando, ero de la antaŭa kolonio hispana (kun Alhucemas – Alucemas-) suferas amashommortiga don de la armeo maroka de 1975. La kaŭzo estas la kontrolo de la petroleo kaj de la fosfatoj de tiu ĉi zono. Fine de julio de tiu ĉi jaro ĉe Unuiĝintaj Nacioj, oni voĉdonos(1) decidon favore (aŭ ne al Maroko), sed Hispanio estas kontraŭa. Fakte, Maroko favoris al Francio kaj Usono por pumpi petroleon tie (kontraŭ la volo de la saharianoj).

b) La fiŝkaptado. Ĝi estas ŝlosilo por atingi de la Eŭropa Unio kreskigon da mono, investojn kaj pardonon de la eksterlanda ŝuldo. De marto, 2001, la

hispana estraro rompis la konversaciojn.

Kiujn konsekvencojn por Melilo?

Melilo estas unu el la plej gravaj iloj de Maroko por persvadi Hispanion. Tamen, oni suspektas, ke tio ĉi estas ununure en la formo, ĉar:

a) historie estas grava eraro: Melilo estis ero de la Hispania Regno tri jarcentoj antaŭ la ekezkisto de Maroko. Ankaŭ, kiam Hispanio okupis Melilon, ĝi estis abandonita delonge zono, kaj ĝi estas urbo de Hispanio kaj de la Eŭropa Unio.

b) Ekonomie estas grava eraro: preskaŭ 500.000 marokanoj en la Rifio vivas (aŭ supervivas) dank'al Ceŭto kaj Melilo. Ambaŭ urboj estas ŝlosilo por la kovrita kaj malkovrita elmigrado kaj fluado ekonomia.

c) Estas eraro –kaj tio ĉi estas tre grava- por Maroko mem, ĉar Maroko estas lando kreita de Okcidento dum la dua duono de la XIX-a jarcento por atingi kontrolon sur la zono. La antaŭa sultano (hodiaŭ Reĝo) alaŭita oprimadis la Rifion. Se Melilo kaj Ceŭto ne ekzistus, Rifio estus tre danĝera loko por la alaŭitoj.

d) La kulturo Melila (kompreneble, ankaŭ Ceŭta) estas mirindaĵo de kunvivado en Hispanio de kulturoj multaj, kaj ĝi estas unu el la elpaŝoj por atingi kulturon de respekto tutmonda.

e) La malforta pozicio de Maroko en la Araba Ligo, danke al sia apogo al Usono kaj siaj kunuloj en momentoj tre malfacilaj por la islama mondo kaj al sia hommortigado Saharien.

Do, kiu estas la kaŭzo vera de tiu ĉi agado rilate al la insuleto Perejil?

La plej grava, kaj preskaŭ ununura kaŭzo estas la apogo de Hispanio por la perforta estradaĉo Maroka de Sahario. Ankaŭ estas grave por Maroko la pliigo de la Eŭropaj helpoj. Pri Sahario estas rimarkinde, ke la saharanoj estas suferante tridek jarojn da mortigado kaj raciisma forigado, de okupigo kaj invadado.

(1) Noto de la Redaktoro: efektive la pasintan 30an de julio la Sekureca Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj aprobis la rezolucion 1429. Ĉi rezolucio prokrastigas la aferon aprobi la organizadon de referendumo en Sahario aŭ la koncedon de aŭtonomia mem-povo de Maroko al la popolo de Sahario. Politike, la aprobo de ĉi tiu rezolucio estis triumfo de la pozicio de tiuj kiuj deziras la sendependiĝon de la teritorio kaj ne la aŭtonomecon ene de la Maroka Regno. Tamen, ankoraŭ la definitiva solvo al la problemo de la estonto de Sahario estas sur la aero.



La Ĝibraltara Markolo, scenejo de konstantaj malkonsentoj inter Hispanio kaj Maroko.

## Dialogoj kun mia Edzino

### Ni intencas filozofii.-

ŜI.- Kara edzo mia, hodiaŭ mi estas ege pensema. En mia kapo bolas multaj ideoj pri ĉi tiu vivo. Ĝuste nun mi pensas, ĉu la vivo estas ĉi tiu, ĉi tiu mondo plena da problemoj, kie abundas tiom da malfeliĉo?

MI.- Mia karulino, ne tiom cerburnu. Pri kio vi vere devas okupiĝi estas, ke via konduto estos ne riproĉinda, ke viaj agoj estas respektemaj kun aliaj civitanoj. Kaj fakte je tio konsistas la vivo. Kompreneble, ĉiu homo havas sian propran karakteron kaj agomanieron.

ŜI.- Jes, vi ĉiam ĉion aranĝas rapide, viaj konsiloj estas bonaj kaj sekvindaj, sed la vivo en si mem ne estas tiele.

MI.- Vi pravas, ekzistas multa problemoj, kiuj devenas de la propra homo. Ĉar vi devas scii, ke la homo estas evoluiĝanta animalo. Kaj se vi demandas al mi, kiam la homo ĝuos plenan raciecon, nu, mi ne scias vin respondi, kaj mi pensas, ke eĉ la plej saĝaj kaj inteligentaj homoj, ne kapablos kontentige respondi vian demandon.

ŜI.- Nu, kia rolo estas la nia en ĉi tiu nomata mondo?

MI.- Nia rolo en ĉi tiu mondo estas tute simpla. Ni estas parto de la naturo, kaj kiel parto de la naturo ni estas ĉi tie por reproduktiĝi. Do, la afero estas simpla kaj ne estas necese esti tre inteligenta por ĝin kompreni.

ŜI.- Vi ĉiam diras, ke ni estas parto de la naturo kaj ke la naturo estas nia patrino. Sed mi pensas, ke la vivo ne povas esti tiom simpla. Mi pensas, ke devas ekzisti, eble io ne konata ĝis nun, kiu gvidas niajn vivojn. Ni ne povas esti simplaj marionetoj de la naturo.

MI.- Mia kara edzineto, ni ne estas marionetoj de la naturo, ni estas la naturo mem. La naturo kiel patrino, kiu havas multajn filojn, se ĉiu filo havas sian propran karakteron, sed malgraŭ tiuj diferencoj inter la gefiloj, ĉiuj estas filoj de la sama patrino. Iom simila estas la naturo, ĝi estas nia patrino al kiu ni ŝuldas la vivon. Krome mi devas diri, ke ni ĉiuj estas parazititoj de la naturo. Kaj al ĉi tiu grupo de parazituloj

ankaŭ apartenas ĉiuj ceteraj animaloj aŭ bestoj, se vi preferas. Kaj pli grave ankoraŭ estas, ke kiam la homo aŭ kiu ajn vivanta animalo aŭ vegetaĵo ne estas sufiĉe forta por elteni la postulojn de la naturo, la naturo mem mortigas ĉiujn malfortajn vivantajn estaĵojn.

**ŜI.-** Mia karulo aŭdante vin ŝajnas ke vi valoras ege malmulte kaj ke nia vivo havas nenian signifon nek celon.

**MI.-** Edzino mia, ne pensu tion. Nia vivo ege valoras, precipe por ke ni kapablas reproduktiĝi. Kial ni amas tiom niajn gefilojn? Ĝuste pro tio, ĉar ĝi estas parto de nia vivo kaj la naturo donas al ni la eblecon plilongigi niajn vivojn pere de niaj posteceuloj. Kaj ĝuste je tio konsistas la kialo de niaj penoj.

**ŜI.-** Ŝajnas ke vi ĉion komplikas. Ĉar evidente vi ne povas kompari homon al sovaĝa besto. Ni havas nian menson per kiu ni povas havigi al ni aliajn vivokondiĉojn kaj konstante ilin plibonigi. Do, tiuj leĝoj de la naturo klarigitaj de vi ne estas tiom simplaj, kiel vi diras.

**MI.-** Vi pravas. Jes, la homo krom de instinkto li havas raciecon kaj ĝuste estas tio, kio distingas nin de la aliaj animaloj. Sendube vi ĉiam aŭdis diri: la homa estas racia animalo. Jen ekzemplo, la leono ĉiam devas mortigi por manĝi. La homo havas aliajn rimedojn por manĝi sen mortigi nenian alian animalon. Kvankam pri ĉi tiu temo estas multe diskutenda.

**ŜI.-** Ofte mi pensas, ke super ĉio, kion vi nomas naturon devas ekzisti alia estaĵo, io pova, kiu regas niajn vivojn. Kion vi pensas?

**MI.-** La demando ne estas nova. Dum miloj da jaroj la pensanta homo prezentas al si tiun demandon. La bestoj, fakte ne faras al si tiun demandon, ĝuste pro tio, ke ili ne estas raciaj kaj ĉiam agadas instikte. Estas evidente, ke en nia ĉiutaga vivo prezentiĝas multaj demandoj, kies respondoj ne estas facilaj. Ĉu iu gvidas niajn vivojn? Sincere mi respondas, ne. Ni estas responsaj de niaj propraj vivoj kaj agado. Ni ne povas kulpi estaĵon nevidebla pri niaj bonaj aŭ malbonaj agoj. Jes mi jam scias, ke granda parto de la homaro pensas tiamaniere, kiun vi aludas. Tio jam estas afero de ĉiu. Sed tio ankaŭ estas kaŭzo, ke la homa menso ankoraŭ ne evoluigis al tiu grado por ĉion kompreni kaj sendube ankoraŭ venos multaj generacioj, kiu sekvos la saman vojon. Alia aspekto grava rilata al via demando,

estas ke ĉiu animalo, inkluzive la homo ege timas la morton. Tiu malapero terurigas ĉiun vivantan estaĵon, kaj al mi ankaŭ, malgraŭ mia pensomaniero.

**ŜI.** - Tamen, mi devas diri al vi, ke kiam mi pensas, ke io supera kaj pova gvidas niajn paŝojn, estas kvazaŭ mi sentus min pli feliĉa kaj mi ne aludas al la religioj, ĉar tio estas tute alia afero. Eble mi ne scias bone klarigi tiujn sentojn, sed por mi io ekzistas, sed mi ne povas konkretigi kio ĝi estas.

**MI.** - Perfekte mi komprenas, karulino mia. Kaj mi konsilas al vi, daŭre "uzi" tiun pensomanieron se tiamaniere vi estas pli feliĉa. Kvankam evidente ĝi alportos nenian solvon al la problemo. Tion jam faras multaj homoj, kiam ili ne havas solvon aŭ respondon al tiuj tiklaj problemoj ilin sin rifuĝas en tiu ŝirmejo de la nescio aŭ ne kompreno.

**ŜI.** - Venas al mia menso multaj ideoj, ĝuste rilataj al viaj pensoj kaj nestas en mia kapo la jena demando, ĉu iam la homo trovos plenan feliĉon? Ĉar, diru al mi, ĉu iam finiĝos tion da fiagoj fare de la homo?

**MI.** - Eble vi devos konsulti al iu profeto aŭ futurologo. Se la homo kapablos zorgi la naturon, se la homo evoluas al plej bona kunvivado sendube la homaro estos pli feliĉa, sed devas veni multaj aliaj generacioj. La tempo ne ekzistas, kaj la homa vivo, kiel produkto de la naturo, nur ekzistas de antaŭ malmulte da tempo se ni komparas ĝin al la universo-ekzisto. Kvankam la scienco ĉiutage malkovras la vivon en la pratempoj kaj prognozas la estontecon, neniuj povas paroli pri estonta realeco. Tio, evidente, surbaze ke la sunsistemo iam ne malaperos por ĉiam.

## La danĝero paroli la japanan lingvon .-

 José María Rodríguez

La ĵusa vizito de la japana ĉefministro Juniĉiro KOIZUMI en Nord-Koreion utilis ne nur por pacigi ĉi danĝeran zonon de la mondo, sed ankaŭ por solvi la misteron de 11 japanoj malaperigitaj en la 70a kaj 80a jardekoj.

Ĝis nun la japanaj aŭtoritatuloj akuzis la reĝimon de Nord-Koreio rapti ĉi 11 simplajn japanajn civilulojn sed Pjongjang' (la ĉefurbo de Nord-Koreio), ĉiam rifuzis la akuzon. Tamen, post la unua renkontiĝo de KOIZUMI kaj Kim JONG-IL, la prezidento de Nord-Koreio, ĉi lasta admisiis la respondecon de sia reĝimo rilate la rapton kaj malaperigon de tiuj 11 japanoj.

Ili estis dudekelkjarajĝaj kiam ili malaperis, la plej juna estis Megumi JOKOTA, dektrijaraĝa junulino kiu malaperis post ludi badminton-matĉo. La reĝimo de Nord-Koreio agnoskis, ke la japanoj estis raptitaj ĉar la sekretaj agentoj de tiu lando bezonis lerni perfekte la lingvon, la kutimojn kaj la viv-manieron de simplaj civiluloj, kiuj poste estus anstataŭigitaj de la nord-koreaj spionoj. La plejmulto el ili estis raptitaj kiam ili troviĝis en Sud-Koreio, tamen du el ili malaperis kiam ili lernis la hispanan lingvon en Madrido en la jaro 1980a.

Kim JONG-IL admisiis, ke ĉiuj japanoj raptitaj mortis, ĉiuj escepte kvar el ili, kiuj estos rajtigitaj reveni en Japanion kiel eble plej baldaŭ. La nord-korea prezidento promesis, ke neniam reokazos ĉi agojn kaj ke la kulpintoj jam estis punitaj, kvankam nenion li diris pri sia ebla respondeco en ĉi tiuj raptoj kaj postaj murdoj.



La japana ĉefministro Juniĉiro KOIZUMI kaj la nord-korea prezidento Kim JONG-IL okaze de sia renkontiĝo meze de la pasinta monato septembro.

## INTERLINGVISTIKO



J.M.R.H.

### PANROMAN UNIVERSAL - UNIAL

En la jaro 1903 la germana Doktoro H. MOLENAAR diskonigis pere de la gazeto *Die Religion der Menschheit* (Religio de la Homaro) en Leipzigo sian projekton PANROMAN, sub la principo, ke ne estis necese krei internacian lingvon ĉar ĝi jam ekzistis, nur estis necese kolekti la internaciajn elementojn de la lingvoj kaj ordigi ilin. En la jaro 1906 la D-ro MOLENAAR ŝanĝis la nomon de la lingvo per la nova UNIVERSAL, por akcenti ĝian universalan kaj ne nur latinidan karakteron. Poste, li renomigis sian projekton UNIVERSAL-LING kaj fine, meze de la 1910a jardeko la lingvo estis definitive nomata UNIAL.

En 1907 MOLENAAR eldonis *GRAMMATIK DE UNIVERSAL PRO ITALIANI, SPANIOLI, FRANCESI, ANGLES E GERMANI*. En ĉi tiu sama jaro la aŭtoro de la lingvo sendis leteron al la registaroj de multaj landoj proponante la komunan uzon de la nova internacia lingvo. En la jaroj 1907 kaj 1908 ekaperis universal-istaj grupoj en Munkeno, Leipzigo kaj en la jaro 1910 ankaŭ en la portugala ĉefurbo Lisbono. En la jaro 1909 oni projektis fondi

akademion de la nova lingvo kaj organizi reprezentetojn en diversaj landoj, tamen ambaŭ aferoj ne realiĝis.

Aperis dum tiuj jaroj tri revuoj en la nova lingvo "*Universal, revist pro propagand de universal-ling, scienc, literatur e kritik*", eldonita en Lisbono; "*Universal-Korespondez, organ por perfexion, kritik e propagand de Universal-ling*", redakita de MOLENAAR mem en Bavario kaj "*Humanitat, organ pro tut interesi humanitar e internazional*".

MOLENAAR eldonis nombrajn broŝurojn kun resumoj de la gramatiko kaj vortaretoj en la angla, franca, germana, itala kaj hispana lingvoj, kaj ankaŭ li aperigis altkvalitan vortaron germana-universal / universal-germana en la jaro 1909. Pro la abunda propagando de la D-ro MOLENAAR multaj ĵurnaloj en la tuta mondo aperigis informojn pri la nova lingvo, tiel en la jaroj 1906 kaj 1907 du hispanaj ĵurnaloj, unu en Sevilo kaj alia en Valencio, ricevis kunlaboraĵojn de du hispanaj universal-istoj per kiuj oni informis pri ĉi tiu lingvo.

La unua mondmilito, kaj poste la dua, malaperigis ĉian internacian agadon favore al la nova lingvo. Tamen, izolite, D-ro MOLENAAR daŭrigis la eldonadon de broŝuroj en Unial kaj eĉ la revueto *Humanitat* daŭre aperis. Tiel, jam en la jaro 1951 aperis sur sveda ĵurnalo intervjuo kun li, kie li sciigis, ke temis pri lingvo kies gramatiko estis eble lerni post dekminuta studado.

La lastan informon kiun mi sukcesis trovi pri Unial estis letero de la D-ro MOLENAAR mem, kie li klarigas, ke la intereso pri la lingvo estas minimuma kaj li aldonas la fakton, ke nur kvar personoj en la tuta mondo korespondas kun li en lia lingvo. Post la morto de la aŭtoro de Unial la lingvo tute malaperis.

## GRAMATIKO

### Alfabeto.-

A-B-C-D-E-F-G-H-I-J-K-L-M-N-O-P-  
Q-R-S-T-U-V-W-X-Y-Z

Ĉiuj ili similas al Esperanto-prononco, escepte:

J = ĵ  
Q = k  
W = ŭ  
X = ks

La kombino SH = ŝĉ

La litero G antaŭ la vokaloj E kaj I fariĝas ĝ kun la sama esperanto-sono.

Kiel en Esperanto la antaŭlasta silabo ricevas la sonan akcenton.

### Pluralo.-

hom = homo  
homi = homoj

La adjektivo ne ŝanĝiĝas en la pluralo. Tiel,

Bon hom = bona homo  
Bon homi = bonaj homoj

### Artikoloj.

Un = ne-difinita artikolo  
El = la

de + el = del

a + el = al

### Pronomoj.-

JO = mi; MI = al mi; ME = min

TU = vi; TI = al vi; TI = vin

LO = li

LA = ŝi

LE = ĝi

NOS = ni

VOS = vi; VO = respektema vi

LOS = ili

LAS = ili (ina ĝenro)

LES = ili (neŭtra ĝenro)

### Posesivoj.-

MON = mia            NOR = nia

TON = via            VOR = via

SON = lia, ŝia,      SOR = ilia

ĝia, sia.

### Verboj.-

La verboj estas tute regulaj.

Infinitivoj finiĝas per -ER

ESER = esti          HABER = havi

PARLER = paroli

AS-tempo, oni demetas la infinitivan finaĵon.

JO ES = mi estas TU HAB = vi havas

LO PARL = li parolas



IS-tempo finiĝas per –EVA.

JO ESEVA = mi estis

TU HABEVA = vi havis

LO PARLEVA = li parolis

La OS-tempo formiĝas per la finaĵo

ERO, ĉi-kaze la akcento ne estas sur

la antaŭlasta silabo sed sur la litero

O, do la vorto povas aperi kun ia

akcento, ĉu normala ĉu cirkumflekso.

JO ESERÓ = mi estos

TU HABERÔ = vi havos

LO PARLERÓ = li parolos

US-tempo per la finaĵo ERE

U-tempo pero la finaĵo E.

### Numeroj.-

0 zero 1 un 2 du 3 tri

4 quar 5 quin 6 six 7 sept

8 okt 9 nov 10 dez 11 undez

12 dudez 13 tridez

14 quardez 15 quindez....

20 vint 21 vint un 22 vint du

23 vint tri.... 30 trent

31 trent un 40 quarant

50 quinant 60 sixant

70 septant 80 oktant

90 novant 100 zent

123 zent vint tri 199 zent novant nov

200 duzent 300 trizent

400 quarzent ....

999 novzent novant nov

1.000 mil

1.000.000 milion

2002 dumil du

1.492 mil quarzent novant du

7.836 septmil oktzent trent six

Unua = unim

Dua = duim

Tria = triim

Kvara = quarim

....

### Kelkaj simplaj voĉoj.-

QUI = kiu

QUE = kio

PORQUÉ = kial NEMO = neniu

UL = iu

TOT = ĉio

TUT = ĉiu

IS = ĉi tiu

IL = tiu

### Komparativoj.-

La finaĵo IOR signifas pli .....

GRANDIOR = pli granda

La finaĵo IM signifas la plej...

BONIM = la plej bona

### Demandoj.-

Por formi demandojn oni metas la verbon komence de la frazo.

PARL TU UNIAL?

Ĉu vi parolas Unial ?

SI, JO PARL UNIAL.

jes, mi parolas Unial.

NO, JO NON PARL UNIAL.

ne, mi ne parolas Unial.

VADERÓ TU A FRANZIA ?

ĉu vi iros en Francion?

NO, JO NON VADERÓ A FRANZIA,  
IS ESTAT JO VOL VIAĜER AD  
ANDALUZIA.

ne, mi ne iros en Francion, ĉi tiu  
somero mi volas vojaĝi en  
Andaluzion.

EKZEMPLOJ / EXEMPLI

Mia patrino deziras aŭdi muzikon  
MON MATR VOL AUDEER MUSIK

La domo de mia amiko estas granda  
EL DOM DE MON AMIK ES GRAND

Ŝi deziras trinki freŝan akvon  
LA VOL TRINKER FRESK AQUA

Hieraŭ mi vizitis la urbon de mia  
patro, mi ŝatas multe vojaĝi kaj koni  
novajn lokojn.

HERI JO VISITEVA EL URB DE  
MON PATR, JO PLES VIAGĜER E  
KONOZER NUV LOKI

Kiam vi aĉetis vian novan domon?  
QUAND VOS KOMPREVA VOR NUV  
DOM?

Ni ankoraŭ ne aĉetis ĝin, ni deziras  
fari tion morgaŭ.

NOS ANKOR NON KOMPREVA LE,  
NOS VOL FAKER IL DOMANI.

PRAKTIKU VI MEM  
PRAKTIKE TU MEM

MON NUV DOM ES BLU

~~(mia nova domo estas blua)~~

QUANT PEKUN TU HAB?

~~(Kiom da mono vi havas?)~~

JO SKRIB UN LETR IN UNIAL. IS  
LING ES SIMPL E FAZIL

~~(mi skribas leteron en Unial. Ĉi tiu  
lingvo estas simpla kaj facila)~~

Birdo estas bela besto

~~(Un av es un bel animal)~~

Kiam vi vojaĝos en la urbon de mia  
patro?

~~(Quand tu viageró al urb de mon  
patr?)~~

BIBLIOGRAFIO

MOLENAAR, H. *Unial-Gramatik pro  
Englesi, franzesi, germani, italiani,  
spanioli*. MUNKENO 1907.

MOLENAAR, H. *Wörterbuch der  
Universalsprache. Deutsh-Universal  
Universal-Deutsh*. LEPIZIG 1909.

Ni daŭrigas la internacian am-  
vortareton. Do, sciuj, ke se Vi iufoje  
renkontas iun unialiston / istinon kiu  
meritas Vian amon, Vi devos diri al li /  
ŝi: JO TI AM.

## VORTARO / VOKABULAR

Akvo	<i>aqua</i>	Granda	<i>grand</i>	Malgranda	<i>pikol</i>
Al	<i>a, ad</i>	Hieraŭ	<i>heri</i>	Manĝi	<i>eder</i>
Alia	<i>altr</i>	Havi	<i>haber</i>	Mono	<i>pekun</i>
Ami	<i>amer</i>	Hodiaŭ	<i>hodi</i>	Morgaŭ	<i>domani</i>
Antaŭ	<i>ante</i>	Horo	<i>hor</i>	Multo	<i>multe</i>
Aŭ	<i>o</i>	Hundo	<i>kan</i>	Ne	<i>no, non</i>
Aŭdi	<i>auder</i>	Infano	<i>infant</i>	Nigra	<i>ner</i>
Bela	<i>bel</i>	Inter	<i>intr</i>	Nomo	<i>nom</i>
Besto	<i>animal</i>	Iri	<i>vader</i>	Olda	<i>viel</i>
Birdo	<i>av</i>	Jaro	<i>an</i>	Paroli	<i>parler</i>
Blanka	<i>blank</i>	Jes	<i>si</i>	Patro	<i>patr</i>
Blua	<i>blu</i>	Juna	<i>yun</i>	Patrino	<i>matr</i>
Bona	<i>bon</i>	Ĵurnalo	<i>journal</i>	Post	<i>post</i>
Botelo	<i>botil</i>	Kaj	<i>e</i>	Povi	<i>poder</i>
Ĉar	<i>perke</i>	Kapo	<i>kap</i>	Ruĝa	<i>rub</i>
Ĉevalo	<i>kaval</i>	Ke	<i>ke</i>	Seĝo	<i>sedil</i>
Ĉiam	<i>sempre</i>	Kelka	<i>quelk</i>	Skribi	<i>skriber</i>
Ĉi tie	<i>hik</i>	Kiam	<i>quand</i>	Studi	<i>studer</i>
Ĉi tiu	<i>is</i>	Kiom	<i>quant</i>	Studanto	<i>student</i>
Danci	<i>danser</i>	Kial	<i>porqué</i>	Sub	<i>sub</i>
Dankon	<i>graz</i>	Kie	<i>ubi</i>	Suno	<i>sol</i>
De	<i>de</i>	Kio	<i>que</i>	Ŝuo	<i>stival</i>
Dento	<i>dent</i>	Kiu	<i>qui</i>	Tago	<i>di</i>
Devi	<i>deber</i>	Kun	<i>kon</i>	Tempo	<i>temp</i>
Dio	<i>dio</i>	Kvankam	<i>benke</i>	Urbo	<i>urb</i>
Dolĉa	<i>dulz</i>	Labori	<i>laborer</i>	Vendejo	<i>butik</i>
Domo	<i>dom</i>	Lakto	<i>lakt</i>	Viro	<i>vir</i>
Doni	<i>doner</i>	Legi	<i>leger</i>	Vorto	<i>vocabl</i>
En	<i>in</i>	Lernejo	<i>skol</i>		
Esti	<i>eser</i>	Lerni	<i>aprender</i>		
Facila	<i>fazil</i>	Letero	<i>letr</i>		
Floro	<i>flor</i>	Libro	<i>libr</i>		
Forta	<i>fort</i>	Lingvo	<i>ling</i>		
Frato	<i>fratr</i>	Longa	<i>long</i>		
Freŝa	<i>fresk</i>	Luno	<i>lun</i>		
Glaso	<i>glas</i>				

Ofte, la redakcio de *Gazeto Andaluzia* ricevas inform-petojn pri nia rubriko INTERLINGVISTIKO. Por informi al ĉiuj eblaj interesitoj pri la lingvoj ĝis nun pritraktitaj, jen kompleta listo:

VOLAPÜK (n-ro 54)	RO (n-ro 61)
SOLRESOL (n-ro 55)	INTERLINGUA (n-ro 62)
NOVIAL (n-ro 56)	NEO (n-ro 63)
OCCIDENTAL (n-ro 57)	GLOSSA (n-ro 64)
LATINO SINE FLEXIONE (n-ro 58)	LING (n-ro 65)
IDO (n-ro 59)	PICTO (n-ro 66)
UNITARIO (n-ro 60)	VIKTO (n-ro 67)
	AUXIL (n-ro 68)

Se al Vi interesas ĉi tiu rubriko kaj mankas al Vi la paĝoj dediĉitaj al unu aŭ kelkaj el tiuj help-lingvoj, ne hezitu peti ilin en la jenan adreson :

Sekcio INTERLINGVISTIKO  
*GAZETO ANDALUZIA*  
 Andaluzia Esperanto-Unuiĝo  
 Apartado de Correos 3142  
 E-14080 CÓRDOBA (Hispanio)

[esperanto14@supercable.es](mailto:esperanto14@supercable.es)

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo jam ne uzas, kiel poŝtan adreson, la Poŝtkeston 864 de Malago. Anstataŭ tiu adreso, se Vi deziras kontakti kun nia asocio, Vi devos sendi leteron al:

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo  
 C/ Armengual de la Mota 33 4-D  
 29008 MÁLAGA

aŭ al la elektronikaj adresoj: [esperanto@navegalia.com](mailto:esperanto@navegalia.com)  
[esperanto14@supercable.es](mailto:esperanto14@supercable.es)

## Paĝoj pri nia Historio


### *Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio*

#### Esperanto kaj la Ibero-amerika Ekspozicio en Sevilo, 1929

Kvankam la iberoamerika ekspozicio okazis en la urbo Sevilo en la jaro 1929, la ideon oni jam lanĉis multajn jarojn antaŭe. Tamen, la unua mondmilito (1914 – 1918) kaj poste la prokrasto de la konstruaĵoj de la ekspoziciejo provokis, ke la inaŭguro de la ekspozicio prokrastiĝis jaron post jaro.

La unuan proponon okazigi kelkan Esperanto-eventon dum la ibero-amerika ekspozicio lanĉis la sevila esperantisto Guillermo CONRADI en oktobro 1911. Tiam la inaŭguro de la ekspozicio estis antaŭvidita por la jaro 1914. Pere de artikolo en sevila ĵurnalo CONRADI proponis okazigi en la urbo Sevilo Universalan Kongreson de Esperanto. Oni profitus la ibero-amerikan ekspozicion por venigi la tutmondan esperantistaron en la urbon Sevilon kaj, siafoje, levi la prestiĝon de la ekspozicio per la alveno de, kalkulite, preskaŭ dumil geesperantistoj de ĉiuj kontinentoj.

Kelkajn semajnojn poste, Trinidad SORIANO, prezidanto de la Grupo Esperantista de Sevilo kaj UEA-delegito en la urbo, sciigis ne nur al S-ro CONRADI sed ankaŭ al ĉiuj eblaj apogantoj de la ideo, ke la Universala Esperanto-Asocio jam planis la okazigadon de la universalaj



Afiŝo anoncanta la Ibero-  
Amerikan Ekspozicion de  
Sevilo en la jaro 1929

kongresoj ĝis la jaro 1915 (1912 en Krakovo, 1913 en Ĝenovo, Parizo en 1914 kaj Usono aŭ Svedio por la jaro 1915). Kompreneble, oni sciis nenion pri la postaj teruraj eventoj de la unua mondmilito.

Do, Trinidad SORIANO klarigis, ke se la ekspozicio fine okazus en la jaro 1914, samtempa okazigado de Universala Kongreso de Esperanto en la urbo Sevilo estus tute malebla. Tamen, Trinidad SORIANO proponis alian ideon, temis pri la organizado de iberoamerika esperantista kongreso en Sevilo samtempe al la ekspozicio, kaj por tio li proponis prezenti la projekton ne nur al la esperantistaro de Hispanio, sed ankaŭ al tiu de Argentino, Urugvajo, Ĉilio, Kolombio, Venezuelo, Meksiko kaj Brazilo. Tamen, post la ne-okazigo de la ekspozicio en la jaro 1914, la unua mondmilito kaj la morto de Trinidad SORIANO komence de la

1920a jardeko, ĉi tiu *propno neniam* estis serioza projekto.

Sed la sevila esperantistaro ne forgesis la ideon uzi Esperanton dum la laboroj por la organizado de la ekspozicio. Tiam, en la monato februaro 1921 Carlos MARTÍNEZ FERNÁNDEZ, UEA-delegito en Sevilo, aperigis en la sevilaj ĵurnaloj *EL NOTICIERO SEVILLANO* kaj *EL LIBERAL* proponon por eldoni propagand-foliojn pri la ibero-amerika ekspozicio en la internacia lingvo Esperanto. Carlos MARTÍNEZ, la neforgesebla *Karolo*, profitis la artikolon por elstari la taŭgecon de Esperanto por diskonigi kiun ajn eventon en la tuta mondo, kaj pro tio li menciis la faktojn, ke en la Hispana Ekspozicio okazinta en Valencio dum tiuj jaroj kaj ankaŭ en la Komerca Foiro de Barcelono, oni uzis Esperanton por la eldonado de la programoj de la foiroj. Li oferis la kunlaboron de la Grupo Esperantista de Sevilo por traduki kiun ajn dokumenton de la onta ekspozicio.

La respondeculoj de la Ibero-amerika Ekspozicio de Sevilo neniam konsideris serioze la proponon. Notinda estas la fakto, ke la partoprenontoj estus aŭ hispane aŭ portugale parolantoj, do, *relative*, ne ekzistus problemoj rilate la diversecon de la lingvoj.

Sed la sevila grupo deziris okazigi kelkan esperantistan eventon dum tiuj jaroj. Ĉi tiel okazis en la monato novembro 1928 la 7a Hispana Kongreso de Esperanto. La solena malfermo okazis en la kunveno de

la centra konstruaĵo ĉe la Placo Hispanio, konstruita de la fama sevila arkitekto Anibal GONZÁLEZ kaj sendube la plej bela konstruaĵo de la ibero-amerika ekspozicio. La sevila urbodomo dankis la esperantistaron pro la organizado de la hispana kongreso en Sevilo kaj pro la partopreno de 400 gesamideanoj de la tuta Hispanio kaj de aliaj ŝtatoj. Eĉ la Komitato de Iniciativoj kaj Turismo de la Urbeŝtaro de Sevilo eldonis tre belan gvidlibron presita sur luksa papero kun 70 paĝoj kaj urboplano, tute en Esperanto kaj kun multaj fotografiaĵoj pri la mondfamaj vidindaĵoj de la urbo.



Ni volas krei veran arĥivon, la arĥivon de Via memoro. Do, se Vi ne scias kion fari kun Viaj Esperantaj revuoj aŭ alitipaj esperantaj kaj Vi estas preta doni ilin al ni, bonvolu kontakti kun ni. Ni pagus ĉiajn sendokostojn.

HISTORIA ARĤIVO DE AEU  
Poŝtkesto 611 E-14080 CORDOBA  
esperanto14@supercable.es

## VENONT-NUMERE...

*La historio de la unua Ilustrita Vortaro de Esperanto, redaktita kaj eldonita de andaluzo...*



Dank'al ĉiu difino Vi trovos vorton. La sekvantan vorton Vi trovos uzante la samajn literojn, escepte de tiu kiu aperas ene de kvadrato. Por iel helpi Vin ni donas la unuan kaj lastan literon de la unua vorto.

**M**        **J**  
 (Plurale, batilo konsistanta el peza ferpeco kun ligna tenilo)

(Plurale, nomo de diversaj ĥemiaj elementoj)

(Plurale, substanco ordinare tirita el grenoj kaj uzata por rigidigi la tolaĵon)

(Mezuro de longo)

(Malgranda malbonodora mambesto ĉasata pro sia felo)

(Adverbe, unuo de elektra rezistanco de kondukilo)

(Sufikso montranta inklinton aŭ kutimon)

(Ĉi vokalo, ene de verda stelo, signifas Esperanton)

La solvon Vi trovos sur la paĝo 24-a. Bonŝancon !!!

Solvo al la Vorta Piramido sur la paĝo 23-a

M A R I E L O J  
 M E I A L O J  
 A M E L O J  
 M E J L O  
 M E L O  
 O M E  
 E M  
 E

BLANK

NIGRE

Kelkaj akademioj  
 sekvas *strangan*  
 instru-metodon...

la anglalingva  
 kurso komenciĝas  
 per  
*My taylor is rich..*

kaj finiĝas per  
*kalkulu la pagendajn*  
*interesojn dum 3*  
*jaroj se la kapitalo*  
*estas x.*



## *La debato por Esperanto*

### NEŬTRALA INTERNACIA LINGVO ESTAS IMANENTE PREVENTA POLITIKO



D-ro med. W. GUNTHER (Centro pri Ekologia Medicino EKOMED)

En la kampoj de etiko kaj politiko plej interkonsenteblaj estas la neideologiaj, objektivigeblaj argumentoj –raciaj en la senco de gravgrade science pruveblaj-. Tio-ĉi validas ankaŭ por Esperanto kaj la debato cele ties enkondukon kiel dua lingvo por ĉiuj.

Modele moderna etiko konkretiĝas en la “etiko de daŭropoveco”, plej konata kiel “la principo respondenco” (Hans Jonas, 1979). Ties imperativo tekstas:

“Agu tiel, ke la efikoj de via agado estu adekvataj al la daŭrado de vere homa vivo sur la Tero; aŭ esprimate negative: Agu tiel, ke la efikoj de via agado ne estu detru(em)aj por la ontaj ebloj de tia vivo; aŭ simple: Ne endanĝerigu la kondiĉojn por la nedifinita pluekzistado de la homaro sur la Tero; aŭ, denove positive turnate: Inkludu en via anta elektado ontan integron de la homo kiel kun-objekto de via volado”.

Evidentas, ke esencaj kriterioj de daŭropoveca agado estas – imanenta minimumigo de metodo-riskoj (kvalita aspekto) kaj – imanenta minimumigo de resurso-disipado (kvanta aspekto).

La sistema konsidero kaj aplikado de tiuj du kriterioj estas nomata “preventado”.

Esperanto apartenas al la malmultaj eltrovaĵoj de la homaro, kiuj estas imanente prevent(iv)aj, tiele plenumante ideale la kondiĉojn de daŭropoveco, kongrue al la principo de respondeco de la nova porviva etiko. La “interna ideo” de Zamenhof fine pruviĝas ankaŭ biosfero-konforma en la senco de imanente vivoprotekta.

Detale:

- Laŭ kvalito Esperanto estas imanente kuniga kaj separiga lingvo, pro kaj el si mem respektanta ĉies propran kulturon, etnan kaj regionan identecojn (kultura diverseco) kaj dekomence evitanta

lingvajn diskriminaciojn –malegalecojn-misproporciojn (demokratia dulingveco). Ĝi altgrade plenumas la kondiĉojn koncerne la Homajn Rajtojn pri propra kaj neŭtrala lingvoj.

- Laŭ kvanto Esperanto estas imanente maldisip(em)a pri naturaj resursoj, pro kaj al si mem respektanta la naturan regulon de "Eta estas bela" (natura diverseco) kaj aparte evitanta necesojn malŝpari resursojn en la kampo de lingva kaj interkompreniĝa kleriĝoj kaj interlingvaj servoj en la globalita mondo (ekologia ŝparpotencialo). Ĝi altgrade plenumas la kondiĉojn koncerne la bazan postulon al la homaj socioj ne (for)konsumi pli multon ol povas esti nature regenerata.

Estas multaj kialoj ideologiaj favori aŭ kontraŭi Esperanton, ofte tiel, ke kaj la favoruloj kaj la kontraŭuloj ne povas interkonsentiĝi ĝis katastrofo por unu el ambaŭ. Preferindas do koncentriĝi unu pri la pli interkonsentebaj aspektoj kaj el tia interkonsento pluagadi.

Oni ne eraru pri la signifo de ĉi argumentado. La makroetiko de la homaro sur limigita Tero kaj je minaco koncerne la lastan por neeltenebla specio kun la pseŭdonio *Homo Sapiens* necesigas ankaŭ internacian lingvon neŭtralan. Fine oni konduktiĝas al la rezulta penso, ke tiuj, kiuj ne apogas tian lingvon konvinke klarigu sian starpunkton laŭ kriterioj de respondeco.

---

La nova respondeculo de la Hispana Libro-Servo estas

LUIS SERRANO PÉREZ.

Jen lia adresoj: C/ Font Nova 32 08202 SABADELL (Barcelona)  
luis\_serrano@mixmail.com

Pere de ĉi tiu servo Vi povos aĉeti librojn kaj materialon en kaj pri Esperanto, kaj inter ili ĵus aperis la nova PLENA ILUSTRITA VORTARO, kun 1.260 paĝoj, kaj ĉi-foje ja temas pri vere ilustrita vortaro. Ĝi estas akirebla kontraŭ 77 eŭroj.

## FLAMENKO

### *La Niña de la Puebla*

Dolores Jiménez Alcántara, konata ene de la Flamenka Mondo kiel *La Niña de la Puebla*, naskiĝis en la sevila vilaĝo La Puebla del Río en la jaro 1909. Blinda ekde sia infan-aĝo ŝi estas, sendube, la plej altkvalita kaj konata flamenka kantistino de la 20a jarcento.

Ŝi kantis sur scenejo unuafoje en Morón de la Frontera, kiel ŝi loĝis, kaj poste ŝi atingis du premiojn en flamenk-konkursoj en Marchena kaj Osuna, sevilaj vilaĝoj. En Sevilo ŝi debutis en la jaro 1931 kaj venontjare en Madrido. Unu el ŝiaj unuaj diskoj estis ŝia versio de la popola kanto *Los Campanilleros*, la kantaĵo fariĝis en ŝia voĉo tiel fama, ke ekde tiam prezenti al *La Niña de la Puebla* ĉe kiu ajn festivalo estis kiel aŭdi tiun kantaĵon.

En la jaro 1936 ŝi organizis turneon tra Hispanio kun sia flamenka festivalo. Post la hispana milito, en la jaro 1947, ŝi denove vojaĝis tra la hispana geografio kun sia flamenka festivalo kie kantis imponaj kantistoj kiel Juanito Valderrama, Pepe Marchena, Pepe Pinto, Rafael Farina kaj multaj aliaj. Ekde la jaro 1978 ŝi ricevis nombrajn omaĝojn, inter kiuj elstariĝas tiu okazita en Malago en la jaro 1986. En la jaro 1999, naŭdekjaraĝa, en Huelvo ekkantis post la ricevo de omaĝo kaj ŝi, subite, suferis koratakon. Ŝi mortis surscene.



La Niña de la Puebla en sia debuto en Madrido

Laŭ la flamenkaj specialistoj, *La Niña de la Puebla* estis sen-egala kantistino en kantaĵoj kiel *malagueñas*, *granaínas* kaj *tarantos*

Jen la teksto de ŝia famega *Los Campanilleros*

En los pueblos (ree) de mi Andalucía  
los campanilleros por la madrugada,  
me despiertan con sus campanillas  
y con las guitarras me hacen llorar,  
y empiezo a cantar  
y al sentirme tos los pajarillos,  
cantan en las ramas y se echan a volar.

Toas las flores (ree) del campo andaluz  
al rayar el día llenas de rocío  
lloran penas que yo estoy pasando  
desde el primer día que t' e conocío  
porque en tu querer tengo puestos los  
cinco sentidos  
y me vuelvo loca sin poderte ver.

Pajarillos (ree) que estáis en el campo  
gozando el amor y la libertad  
recordarle al hombre que quiero,  
que venga a mi reja por la madrugada  
que mi corazón se lo entrego al momento  
que llegue  
cantando las penas que he pasao yo.

## Recenzo ...

*Esperantismo, prelegoj kaj eseoj*, de Giordano MOYA, 20 cm x 13'3 cm. Unua eldono junio 2002. Eld. Barcelona Esperanto-Centro, str/ Bassegoda 10 3 1 08028 Barcelono. ISBN 84-607-4509-0.

*Interna Ideo*, jes; *Interna Ideo*, ne. Jen la sintezo de du kontraŭstaraj sintenoj regantaj en Esperantio. Dekomence estis personoj kiuj preferis identigi la Esperantan Movadon kiel tiun celanta ekskluzive la disvastigon kaj uzon de la lingvo Esperanto sendepende de la homaranismo proponita de Zamenhof. Giordano Moya en sia verko *Esperantismo, prelegoj kaj eseoj, defendas la jenan tezon: la Esperanta Movado stagnas ĉar la plejmulto de la esperantistoj influantaj rifuzas eĉ paroli pri la interna ideo*. Laŭ li, tiel la mondo kiel la Movado bezonas plenumi senrezerve lian mesaĝon identigitan en Esperantio per la vorto *homaranismo*. Alie, tiel la homarunuigo kiel la *disvastigo de la lingvo Esperanto* tute maleblas.

*Esperantismo, prelegoj kaj eseoj*, la verko kies mallongan recenzon vi legas ĉimomente, estas kompilaĵo el prelegoj kaj eseoj de la aŭtoro pri Esperanto. Ripete kaj ripete, Moya denuncas en ili, ke dum la mondo spertas financajn, komercajn kaj industriajn unuigojn tutmondan, ĝi troviĝas spirite en frapanta disiĝo. Li honeste rimarkas la fiaskon de la Movado ĉar ĉi tiu maltrafis tute taŭgan strategion. La lingvo Esperanto enradikiĝas en la socio *ne pro sia facileco sed pro sia interna ideo*. Tute ne gravas, ĉikaze, ĉu la interna ideo enhavas la lingvon, ĉu la lingvo enhavas la internan ideon. Kio gravas estas ke ambaŭ reciprokas tiel ke neniu el ili antaŭeniras sen la alia. Same la homarunuigo okazos nur se la mondo, t.e. ĉiu viro kaj ĉiu virino *konscias la neceson ĝeneraligi reciprokan toleremon kaj komprenemon*.

Kiel diras la aŭtoro en la parolado verkita por la *Antaŭkongreso* en Barcelono de la 78a UK en Valencio 1993, "tiu kultura klopodado estas precize la tasko de la esperantismo kaj nur la esperantismo povas efike entrepreni ĝin. Nur la lingvo Esperanto, tute neŭtrala pri naciismoj kaj interesaj imperialismoj, taŭgas por tiu tasko. La angla lingvo povas taŭgi por komercado, por tekniko, por scienco kaj eĉ por turismo, sed ne taŭgas por unuigi la homaron, en tio nur povas roli Esperanto". Resume, la kerno de ĉi verko de Moya estas pruvi, ke homarunuigo maleblas sen esperanto, kaj ke la restado kaj la vigliĝo de Esperanto maleblas sen la interna ideo.

*Andrés Martín González*

## ANDALUZA KUIRARTO

### Cepumita Tinuso

Ĉe la kadiza marbordo oni kaptas la tinusojn ekde la romiaj tempoj laŭ propra maniero, kiu jam dum la araba epoko ricevis la nomon *almadraba*. Laŭ ĉi tiu sistemo grupo de fiŝkapt-ŝipoj kune ĉirkaŭigas la tinusojn kiuj trapasas la ĝibraltaran markolon.

Kompreneble en ĉi tiu regiono la tinuso estas kutima manĝaĵo ĉe la kuirejoj. Hodiaŭ ni prezentas cepumitan tinuson laŭ la maniero de la vilaĝo Barbate, ĉe la kadiza marbordo.

#### Jen la Ingredientoj por 4 personoj:

- \* Unu kilogramo da tinuso, tranĉita laŭ kvadratoj longe du aŭ tri centimentroj.
- \* Tri ajleroj.
- \* Granda cepo.
- \* Petroselo.
- \* Du laŭraj folietoj.
- \* Glaso da oliv-oleo.
- \* Glaso da blanka vino.
- \* Nigra papriko.
- \* Salo.

#### Jen la farado:


Ene de pato oni varmigas la oliv-oleon. Poste lasu la oleon malvarmiĝi. Kiam la oleo estas tute malvarma oni kovras ĝin per maldikaj ruletoj de cepo.

Metu la tinuson sur la cepo. Ankaŭ metu la petroselon, la nigran paprikon, la ajlerojn (maldike tranĉitaj), la vinon kaj la salon.

Varmigu ĉion dum kelke da tempo sur ne tro forta fajro. Atentu, ke la cepo devas esti mola sed ne ora.

Apartigu la poton de la fajro, demetu la petroselon kaj la laŭron. Metu sur teleron la tinuson kaj la cepon.

Kaj BONAN APETITON.



La *almadraba* estas antikva sistemo komune fiŝkapti la tunisojn ĉe la kadiza marbordo

Universala Esperanto-Asocio  
 ESTRARO  
 Centra Oficejo  
 en ROTTERDAM, Nederlando

*Centro pri Ekologia Medicino*  
 EKOMED  
 D-ro med. W. GUNTHER  
*Apartado de Correos 270*  
 ES-03170 ROJALES (Alicante)

87a Universala Kongreso de Esperanto, 2002  
 Fortalezo, Brazilo.

## SALUTMESAĜO

### OKAZE DE LA INTERNACIA JARO DE EKOTURISMO

Karaj samideanoj,

Kiel ano de la Asocio de Verduloj Esperantistoj (AVE) mi ĉimesaĝe salutas la 87an Universalan Kongreson de Esperanto en Fortalezo.

*Estas du kialoj por kiuj ĉitempe denove atentigas pri la imanente preventaj kriterioj de daŭropoveco en la Internacia Lingvo Esperanto. Unue UNO kaj WTO deklaris la jaron 2002 Internacian Jaron de Ekoturismo kaj due ĝuste Brazilo apartenas al la ekologia kriza zono de bioresurse kaj modklimata gravaj tropikaj praarbaroj.*

Laŭkvalito Esperanto estas el si mem protekta pri la homaj resursoj. Ĝi estas kuniga lingvo, respektante la kulturalan diversecon kaj evidenta lingvajn malegalecojn. *La demokratia plurlingveco per Esperanto altgrade plenumas la kondiĉojn koncerne la Homajn Rajtojn pri propra kaj neŭtrala lingvoj.* Laŭkvante Esperanto estas per si mem protekta por la porvivaj resursoj. Ĝi estas maldisipa lingvo, respektanta la naturan diversecon kaj evitanta nenecesajn investojn kaj elspezojn je materialaj resursoj kampe *de lingva kaj interkompreniĝa kleriĝoj kaj interlingvaj servoj en la globiligita mondo.* La ekologia ŝparpotencialo per Esperanto altgrade plenumas la kondiĉojn koncerne la bazan postulon al la homaj socioj ne konsumi pli multe ol povas esti nature regenerata.

En la Internacia Jaro de Ekoturismo precipe ĉi lasta daŭropoveca aspekto estas aparte grava. Ekoturismo ja signifas, ke por laŭeble plej multaj homoj laŭeble plej nedifekta naturo povas esti laŭeble plej daŭre *prezentebla kaj spertebla. Cele tion necesas ekologia konscio pri la anturo kiel tia kaj ne nur kiel pli-malpli objekto de homa plezurigo.* Ĉikuntekste indas atentigi nian Movadon, ke apartenas al la trea esenco de esperanto

disponi al iu homo povon kaj eblon sen grandaj investoj kaj devigoj al kleriĝa turismumado neŭtrale kaj kompetente komunikadi el la propra vivloko al la cetera mondo kun fidinda certeco esti komprenata. Finfine ĉe turismo estas kiel ĉe medicino: Ju pli superflua des pli bona.

Politike neŭtralaj ekoloĝoj de nia Movado konstatas, ke, samkiel la mondo bezonas Esperanton kiel persocian kaj pornaturan preventilon, tiel la Esperantismo forme de siaj organizaĵoj bezonas fiksitan kaj fiksan ekologian konscion kiel bazon de la propra laboro. La t.n. progreso de la homaro ja estas jam sufiĉe mortiga. Esperanto en siaj oficialaj strukturoj ne povas esti parto de tio.

Esperanto nepras, ĉar ĝi porvive estas la plej bona internacie interkomunikada solvo. Ni donu bonan modelon !

Mi deziras al la kongreso harmonion, ĝojon kaj sukceson !

Wolfgang Gunther.

### ĈU VI JAM REKOTIZIS POR LA JARO 2002 ?

Memoru, ke la ĉi-jara kotizo estas 15 eŭroj. Uzu la kontojn de la asocio en unu el la jenaj bankoj:

BBVA 0182 3361 340207160711

Caja General de Ahorros de Granada 2031 0225 54 0100187657

*Esperanto-Andaluzia*

Post la pago sendu leteron al la adreso de AEU. DANKOJN

## TURISMI EN ... CASTRIL

La vilaĝon Castril (prononcu *Kastril*) fondis la romianoj kiuj nomis ĉi tiun militan establejon "Malgranda Kampadejo", jen la origino de la nomo de la vilaĝo. Dum la almohada periodo la araboj konstruis tie kastelon kaj la vilaĝon ili nomis *Qastalla*. Kiam la kristanoj konkeris la Murcian reĝlandon la landlimo inter tiu regno kaj tiu de Granado en la jaro 1266 estis la kasteloj de Orce, Huescar, Galera kaj Castril. Ekde tiam kaj ĝis la definitiva konkero de la kristanoj en la jaro 1490, do nur du jaroj antaŭ la konkero de Granado mem, la vilaĝo Castril estis okupita jam de la kristanoj jam de la araboj. Post la jaro 1490 la katolikaj gereĝoj donacis la vilaĝon al la sinjoro de Zafra. Kreiĝis tiam la vilaĝo Castril de la Peña.



La vilaĝo Castril etendiĝas sub samnoma monto

Hodiaŭ Castril estas unu el la plej belaj vilaĝoj en la provinco Granado. Ĉirkaŭ ĝi troviĝas la monto Castril,

apuda al la fama *Kazorla Siero*. La samnoma rivero Castril, kun purega kaj abunda akvo, trakuras sub la monto kie situigas la vilaĝo.



La pezaĝoj videblaj en la Siero de Castril estas paradiza vidaĵo

Castril estas paradizo por tiuj kiuj amas la Naturon. La rivero kreis meze de la montaro kanjonojn, grotajn kaj karstaputojn kaj la abunda pluvado faciligas la ekziston de riĉaj arbaroj en la zono.

Ĉi tiel, unu el la plej produktivaj industrioj kiuj lastatempe disvolviĝas estas la *kampara turismo*. Tie la vojaĝanto povas ĝui la plej trankvilan etoson ĉe domo meze de la Naturo, ĉirkaŭigita de arbaro, rivero kaj kvieteco.



Por atingi Castril vi devas sekvi la aŭtovojon A-92 ĝis Baza, tie la vojo C-323 ĝis Pozo Alcón kaj de tie la vojo C-330 ĝis Castril.

La vilaĝo Castril estas aro da blankaj mallarĝaj stratoj. La tuta vilaĝo kuŝas sub la monto Castril. Jen konsilo por vizitanto de Castril, divenu kiu pejzaĝo estas pli bela, ĉu la monto vidita de la vilaĝo, ĉu la vilaĝo de la montopinto, malfacila afero.



En Castril eblas realigi abundajn naturajn ekskursojn

La ĉefa monumento de la urbo estas la belega preĝejo kun du belaj frontispicoj de la jarcentoj 16a kaj 17a. Elstarinda estas ankaŭ la kastelo, kvankam nur ekzistas restaĵoj de la muroj kaj la turoj. Apud la vilaĝo troviĝas la "kampadejeto", restaĵoj de la primitiva romia fortikaĵo, origino de Castril antaŭ dumil jaroj.

### Ĉefaj Festoj:

En la monato oktobro, koincide kun la festo de la Virguliono de la *Rosario*, okazas taŭrofestoj similaj al tiuj de Pamplono. La 3an de majo okazas la festo de la Sankta Kruco, tiam la Castril-anoj ornamas la stratojn kun belaj krucoj.

Se vi deziras manĝi en Castril ni konsilas al vi gustumi la truton kun ŝinko, la pork-piedojn kun papriko, la sangokobalson aŭ la kapridon.



Detalo de la turo de la preĝejo en Castril

venont-numere

**TURISMI EN ...**

**FRIGILIANA**

(Malago)

## MISTEROJ KAJ LEGENDOJ DE ANDALUZIO



J.M.R.H.



### Sorĉistinoj en Andaluzio

Unu el la plej oftaj akuzoj kontraŭ virinoj okaze de la procezoj de la Inkvizicio estis la realigado de sorĉagadoj. Oni ne scias ekzakte kiom da virinoj akuzitaj, kaj poste bruligitaj, havis reale rilatojn kun demonaj entoj, sed, kompreneble, la plejmulto el ili deklaris ke ili estis sorĉistinoj post tortura demandaro. Ni prezentos hodiaŭ la deklarojn kaj akuzojn faritaj de kelkaj el tiuj kompatindulinoj kiuj estis akuzitaj esti sorĉistinoj.

En la jarĉento 16a Quiteria de Morillas deklaris, ke okaze de la sorĉrenkontiĝoj oni disdonis magiajn polvojn kaj unĝentojn faritaj de graso, opio, beladono, konio kaj aliaj planktoj. Same, ŝi ŝmiris sian poplilon, ingvenojn, akselojn kaj kubutojn per unĝento farita de vakso, peĉo, absinto, kolubroj kaj mortinta infano. Ŝi, kune kun aliaj sorĉistinoj, iris en la herbejon, kaj tie ĉiuj dancis kun 108 demonoj, ili neis Dion kaj donis siajn animojn al la diablo.

Laŭ la sankta inkvizicio la sorĉistinoj estis virinoj kiuj paktis kun la diablo. Ili senvestiĝas dumnokte kaj ŝmiras sian korpon per aromaj unĝentoj. Ili flugas rajdante sur balailoj kaj iras en la Sablejon de Sevilo kie ili

renkontiĝas. Ili suĉas la sangojn de siaj malamikoj, kaj la infanoj povas morti se oni ne metas apud ili saketon kun la Evangelioj aŭ la Regularo de Sankta Benito.

En Guadalcanal, sevila vilaĝo, laŭdire la sorĉistinoj renkontiĝis sabate nokte, iomete antaŭ la deklua horo. Ili rurgenuiĝis kaj ĉiuj kune kriis *Malfermu Refaldo*. Tiam ili levis brikon kaj tie aperis skatolo kun unĝentoj. Ili ŝmiris siajn korpojn per tiuj aromaĵoj. Poste ili rajdis sur siaj balailoj kaj tra la aero iris en kelkan monton kie okazis la renkontiĝo de ĉiuj sorĉistinoj.

Por forigi la sorĉistinojn estis necese diri:

<i>Toca, toca</i>	<i>Tuŝu, tuŝu</i>
<i>grillos con tus pies</i>	<i>grilojn per viaj</i>
<i>y freno en tu boca.</i>	<i>piedoj kaj</i>
<i>Dios me libre a mi</i>	<i>bremsu vian</i>
<i>y a mi casa toda.</i>	<i>buŝon.</i>
<i>Hoy es sábado.</i>	<i>Dio savu min kaj</i>
<i>Ave María.</i>	<i>mian tutan</i>
	<i>hejmon. Hodiaŭ</i>
	<i>estas sabato.</i>
	<i>Ave Maria.</i>

## ORDINARA ASEMBLEO ĜENERALA DE ANDALUZIA ESPERANTO-UNUIĜO

Mi alvokas ĉiujn membrojn de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo ĉeesti kaj partopreni en la Ordinara Ĝenerala Asembleo de ĉi tiu asocio okazonta en la *Centro Cívico* en Malago, la 12an de oktobro 2002.

### Tagordo:

1. Legado kaj aprobo, se dece, de la akto de la antaŭa kunveno.
2. Kontostato je la 31a de decembro 2001.
3. Buĝeto por la jaro 2003.
4. Instruado de Esperanto.
5. Kristnaska Loterio.
6. Esperanto en Bibliotekoj.
7. Propagando.
8. *Monate ĉe Vi kaj Gazeto Andaluzia.*
9. Opiniaro.
10. Andaluzia Esperanto-Unuiĝo kaj Esperanta Civito.
11. Eŭroparlamentanoj.
12. Petoj kaj demandoj.

Malago, la 9an de aŭgusto, 2002

*Andrés Martín González*

Prezidanto de Andaluzia Esperanto Unuiĝo

---

### *Rajtigilo*

\_\_\_\_\_ rajtigas al  
\_\_\_\_\_ ankaŭ  
membro de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo reprezenti min kaj voĉdoni je mia nomo la proponojn prezentotajn en la Ordinara Asembleo Ĝenerala de ĉi tiu asocio en Malago la 12an de oktobro 2002.

\_\_\_\_\_, 2002

Subskribis

---

## ESPERANTO APLIKATA

(Havigitaj de la *Dirección General Política de la Pequeña y Mediana Empresa*. Madrido. Hispanio).

Lando: Francio

Refe: REF 3917/02

Franca entrepreno specialisto pri telefoninstalado havigas komplementajn servojn teknikhelpajn kaj poŝtvendajn.

La entrepreno serĉas privatajn investantojn.

Lando: Francio

Refe: REF 3918/02

Franca entrepreno specialisto pri fabrikado de sciencaj aparatoj serĉas privatajn investantojn. Ĝia klientaro konsistas ĉefe el grandaj kontoj kaj malgrandaj kaj mezaj entreprenoj naciaj kaj eŭropaj. Oni vendas ĝin tute. Prezo: 140.000 eŭroj. Ref: ID 10.

Lando: Francio

Refe: REF 3919/02

Franca entrepreno specialisto pri servoj de industria purigado. La entrepreno agadas en la jenaj kampoj:

Purigado de planktapiŝoj, tegaĵoj kaj plankoj;

Purigado de fenestro kaj vintroj;

Komplementaj teknikaj helpoj al oficejoj kaj aŭtomovihaltejoj, plankoj kaj pavimoj.

Oni vendas ĝin tute. Laŭkonsenta prezo. Ref: SE 1068.

Lando: Francio

Refe: REF 3921/02

Franca entrepreno specialisto pri farado de laboraĵoj bezonantaj specifajn metodojn. Tre specialajn laboraĵojn ĝi realigas en la jenaj kampoj: artaĵoj, industriejoj, fundamentoj, publikaj konstruaĵoj, civila inĝenierigado, ktp. Ĝia klientaro konsistas ĉefe el administrantaroj kaj lokaj organizoj, industrioj kaj aliaj entreprenoj. Rekonita profesieco kaj internacia famo. Sana strukturo financa kaj bona rentado. Oni vendas ĝin tute. Ref: BT 1071.

Lando: Francio

Refe: REF 3923/02

Franca entrepreno specialisto pri vendado kaj transformado de plastaj pakaĵoj. Ĝia listo de produktoj enhavas membranetojn elastajn permanajn kaj mekanikajn, tegilojn aĝustigeblajn kaj neaĝustigeblajn, algluiĝajn bendojn,

Ŝirmajn membranetojn, matracajn tegilojn, pakmaterialon, polietilenajn saketojn, ktp. Oni vendas ĝin tute. Prezo: 1'5 M. francaj frankoj. Ref: NE 1073.

Lando: Francio

Refe: REF 3924/02

Franca entrepreno specialisto pri fabrikado de maŝiniloj por barelsekto. Ĝia klientaro konsistas ĉefe el barelfabrikantoj (95% el ĝia negocoĝado). Ĝia agadkampo estas regiona, nacia, eŭropa kaj internacia. Oni vendas ĝin tute. Ref: ID 1075.

Lando: Francio

Refe: Ref 3925/02

Franca entrepreno specialisto pri fabrikado de mebloj komercas en tri gamoj. Ĝia klientaro konsistas ĉefe el meblovendoj, arkitektoj kaj privatuloj naciaj. La entrepreno kreskantas. Oni vendas ĝin tute. Ref: ID 1077.

Lando: Francio

Refe: REF 3926/02

Entrepreno specialisto pri transporto kaj pumpado de betono. Ĝia klientaro konsistas ĉefe el grandaj kontoj de la konstruadsekto. La entrepreno disponas gravan kaj kompletan profesionan materialon. Oni vendas ĝin tute. Prezo: 7 M francaj frankoj. Ref: TR 1078.

Lando: Francio

Refe: REF 3932/02

Franca entrepreno specialisto pri instalo kaj teknika helpo en hejtado, fontanado kaj klimatizo. Plie, ĝi realigas elektrajn instalaĵojn. Ĝia klientaro estas loka. Oni vendas ĝin tute. Ref: BT 1082.

Respondeculo: Andrés MARTÍN GONZÁLEZ  
esperanto@navegalia.com

Financa Raporto de Andaluza Esperanto-Unuiĝo (jaro 2001)

## Elspezoj

Poŝto	170'69	eŭroj
Fotokopioj	286'50	"
Loterio	1.450'84	"
Publikaĵoj	57'68	"
Bankaj Komisioj	26'50	"
Membrokotizoj	15'93	"
Poŝtmarkoj	23'29	"
Elpreno I.R.P.F.	0'09	"
Asembleo	33'06	"
Kotizo al H.E.F.	18'03	"

---

Entute: 2.082'61 eŭroj

## Enspezoj

Membrokotizoj	742'85	eŭroj
Interesoj	1'92	"
Instruado	7'75	"
Asembleo	18'03	"
Loterio	1.468'63	"

---

Entute: 2.239'18 eŭroj

Jara Saldo:  $2.239'18 - 2.082'61 = 156'57$  eŭroj

Antaŭa saldo kredita je 31-dec-2000 = 5.104'03 eŭroj

Nova saldo kredita je 31-dec-2001 = 5.260'60 eŭroj

# Andaluzia Esperanto-Unuiĝo Asociación Andaluza de Esperanto



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio.

Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

## Estraro

Prezidanto : Andrés Martín González

Vic-Prezidanto: José Francisco Martín del Pozo

Sekretario: Jesús García Martínez

Kasisto: Julio Herrero Segura

Voĉdonanto pri Propagando: José María Rodríguez Hernández

Delegito pri rilatoj kun Blinduloj: Alejandro Iglesias Campos.

Adreso: C/ Armengual de la Mota 33, 4D E-29007 MÁLAGA

E-Adresoj: [esperanto@ciudadfutura.com](mailto:esperanto@ciudadfutura.com)

[esperanto14@supercable.es](mailto:esperanto14@supercable.es)

[esperanto@navegalia.com](mailto:esperanto@navegalia.com)

TTT-paĝo: [www.ciudadfutura.com/esperanto](http://www.ciudadfutura.com/esperanto)

## Aliaj interesaj adresoj de la Esperanto-Movado

\* Universala Esperanto-Asocio

Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)

[uea@inter.nl.net](mailto:uea@inter.nl.net)

\* Hispana Esperanto-Federacio

C/ Rodríguez San Pedro 13-3-7 28015 MADRID (Hispanio)

[admin@esperanto-es.net](mailto:admin@esperanto-es.net)

P

## Pejno

*Fraŭlinojn elegantajn, sekvantajn de l' patrino  
-Kun ventumil' en mano, kun pejno kaj mantiljo-  
Preteriras fraŭloj, piropon transvokante,  
Kaj sprite tuj respondas filinoj de Sevilo*

KANTO AL SEVILJO de Teo JUNG (1928)

Teo JUNG en la glosaro de sia *Kanto al Sevilo* donas la signifon de ĉi tiu vorto *PEJNO*. Temas pri la hispanlingva "Peina" aŭ "Peineta", t.e. alta kombilo uzata pasintec de la andaluzaj virinoj okaze de festoj, ekz. taŭroludoj, religiaj festoj, ktp.

---

ESPERANT-LINGVAJ VORTOJ KIUJ, HISTORIE AŬ  
ETIMOLOGIE, DEVENAS DE ANDALUZIO.